



ESPERANTO JUNAS EN FRANCO

Jean



Sperant



INFO

Magazine de l'association JEFO

JEFO-INFORMAS

MARS/AVRIL/MAI


N°96/2

25FRF



Du 16 au 19 mai 96 à Lyon - Villeurbanne

Avez-vous renvoyé votre bulletin d'inscription ???



3615 ESPERANTO



1,29 F/min

Adresaro de JEFO-komitato

Prezidanto:

Bruno FLOCHON
6 C, av. de l'Hippodrome
69890 La Tour de Salvagny
☎ 78 48 00 40 (R) / ☒ CITRON

Vicprezidanto:

Thierry SALOMON
29 A, rue Mgr Sieffert
67310 Irmstett

Sekretario:

Laurent VIGNAUD
25, chemin de la Brosse
49130 Les Ponts-de-Cé
☎ 41 30 08 70 (R) / 41 69 70 12
☒ JEFO49
Kontaktoj: FFEA, GAE

Kasisto:

Olivier MOREAU
48, rue Raffet
75016 Paris
☎ (1) 42 88 51 58 / ☒ TAK

Philippe BERIZZI

17, allée Jean-Baptiste Clément
78570 Andresy
☎ (1) 39 70 78 15 (R) / ☒ JEFO78
<pberizzi@pratique.fr>

Yves BACHIMONT

Rés. des Elfes - appt 15
20, chemin de Bordeblanche
31100 Toulouse
☎ 61 49 32 15 / ☒ VIVAKVO
<aecnm@meteo.fr> (ne persona adreso)

Bernard BOURON

Rés. "les Argonautes"
Bât. A - 521, av. Jack Kilby
06270 Villeneuve-Loubet
☎ 93 73 92 91 / ☒ ZIKO

Tony GUYOT

8, rue Jules Guesde
35000 Rennes
☎ 99 31 32 78 (R) / 99 35 09 44 (Faks)
☒ ROAZHON
<mts100@matra-com.fr>
Kontaktoj: TEJO, EUROKKA

Didier LOISON

5, rue de la Graûche
89100 Villeroy
☒ JEFO89

Alain FAGOT

Quartier "Les Prés"
26730 Eymeux

Pascal LECAILLE

BP 3019
69394 Lyon CEDEX 03
☎ 72 36 07 14

Via vojaĝkalendaro

Majo

11-12: Kroatio, Zagreb: internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI
11-18: Nederlando, Hago: Internacia Fervoja Kongreso
16-19: Francio, Lyon: *LA FESTO* de JEFO kaj Nacia Kongreso de UFE
24-27: Belgio, Antverpeno: kultura kaj turisma semajnfino
24-27: Germanio, Liegbitzsee ĉe Berlino: Pentekosta tendaro
24-24: Irano: 7a ĝenerala IREJO-kunveno "Printempa renkontiĝo"
25-27: Loire-Atlantique, Le Pouliguen: stud-staĝo
25-26: Britio, Londono: OKEJ
27-02: Vogezoj, Mittelwihr: 12a Flaŭrista Semajno
28-30: Ĉeĥio: 6a Praga internacia konferenco pri kibernetika pedagogio

Junio

07-09: Kanado, Kebekio, Ste-Catherine-de-Halley: Printempa renkontiĝo
08-09: Francio, Colmar: 1a scienc-teknika seminario de TAKE
08-10: Portugalio, Guimaraes: 16a renkontiĝo de Portugalaj E-istoj
10-15: Svedio, Karlskoga: Somera kurso (diversaj niveloj)
13-16: Pollando, Torun: 16a internacia renkontiĝo de Popolaj Orkestroj
15-16: Bulgario, Gabrovo: seminario la "kuracherboj kaj nuntempa medicino"
22-24: Venezuelo, Karakaso: 7a Nacia Renkontiĝo
23-30: Ukrainio, Krimeo: "Jalta Internacia Semajno"
24-12: Usono, San Francisko: 27a somerkursaro
25-01: Estonio, Vosu: Seminario "Esperanto kaj naturo"
28-30: Koreio, Taejon: Koreia Tutlanda Renkontiĝo
28-30: Germanio, Wildberg/Sulz am Eck: 4a ETNO (junulara tendaro)

Julio

02-07: Ĉinio, Pekino: Internacia Junulara Somera E-Kampadejo
05-10: Brazilo, Ribeiro Preto: 32a Brazila E-kongreso
07-14: Germanio, Thomsdorf: Somera E-ista Familia/Feria Tendaro
08-12: Usono, Detrojto: Intensaj E-kursoj 30-horaj
13-15: Bulgario, Tarnovo: 14a sesio de Internacia Somera E-Universitato
13-20: Rusio, Sankt-Peterburgo: SAT-kongreso
14-18: Hungario, Hodmezovasarhely: 2a Eŭropa Medicina E-Konferenco
15-21: Ĉinio, Pekino: internacia infana E-somera semajno
20-27: Ĉeĥio, Prago: 81a Universala Kongreso (kaj kongr. de blinduloj)
27-31: Slovenio, Maribor: internacia seminario pri modernigo de E-instruado
28-04: Slovakio, Bratislavo: renkontiĝo de E-istaj familioj
29-05: Germanio, Güntersberge: 52a Internacia Junulara Kongreso

Aŭgusto

02-10: Latvio, Jurmala: 32aj Baltiaj E-tagoj
03-09: Irano, Sabalan: 2a IREJO-ekskurso
03-17: Ĉeĥio, apud vilaĝo Sebranice: 6a IKUE-tendaro
06-09: Japanio, gubernio Okayama: 15a Komuna Seminario de aziaj gejunuloj
06-11: Danio, Kopenhago: 5a Kultura Esperanto-Festivalo
11-17: Nederlando: Ejselmera Migra Aventuro, velŝipa migrado
11-18: Maine-et-Loire, kastelo Grésillon: kurso por komencantoj
12-19: Hispanio, Valencio: Somera internacia kurso
13-19: Hungario, Eger: Internacia Junulara Semajno
17-23: Slovakio, Poprad: Turisma semajno en Altaj Tatroj
19-31: Hungario, vilaĝo Délegyháza: 5a MELA (MEMzorga LAGumado)
22-25: Ĉinio, Shanghai: 1a azia kongreso de Esperanto
23-30: Madagaskaro, Antananarivo: 1a E-kongreso de la Hinda Oceano kaj de la Orient-Afrika landoj


Tiujn informojn kaj multajn aliajn vi povas trovi ĉe niaj retservoj:

minitelo: ☎ 36 15 ESPERANTO

internet: ☎ <http://www.worldnet.fr/~mjb/jefo/>

Enkonduko

Post iom da malfruo, vi finfine tenas en viaj manoj la duan numeron de JEFO-Informas/JeuneEspéranto-Info por la jaro 1996. Sed sciu, ke tiu numero travivis kelkajn aventurojn antaŭ sia presado.



Kiel la pasintaj, ĝi normale devis havi kiel redaktorinon Evelyne. Sed pro "feliĉa okazaĵo" en ŝia vivo, mi devis transpreni en urĝeco la taskon redakti tiun numeron de la bulteno de JEFO.

Mi do tiel profitas la okazon por anonci al vi, ke JEFO havas novan (junan!) membron: Tatiana Dachine. Ŝi naskiĝis la 23an de Aprilo.

Bonan legadon al ĉiuj ...

Tony

Enhavo

- 4 Malesperantio
- 7 Krokodilo
- 7 *Petite recette pour grandes surprises*
- 8 *Le mot du président*
- 9 Tra Rumanio per Pasporta Servo
- 13 Muzika angulo
- 14 Esperanto-renkontiĝoj
- 15 Leteroj de niaj legantoj



Ni faru la FESTO'n en Liono!

Radioj

La 17an de Februaro inter la 9a horo 30 kaj la 10a horo, **France Inter**, rue des Entrepreneurs (strato de entreprenistoj): okaze de Expolangues, profesoro Claude Hagège prezentis Esperanton dum kvin minutoj, aludante ambigue pri ties simpligitaj vortprovizo kaj gramatiko, sed ne pri facileco. (informas Clair Mahé kaj CNX*CELTILL)

Televidoj

Fine de Januaro, **France 2**, televidjurnalo de la 20a horo: aludo pri Radio Vatikano, kiu elsendas eĉ en Esperanto. (informas Thierry Daugu)

La 27an de Februaro, en pariza kabla televidkanalo **Paris Première**, okazis intervjuo de esperantistoj en elsendo pri Umberto Eco (vidu paĝon 6).

Gazetoj

Revuo **l'autre et moi** (la aliulo kaj mi) haltiĝas post sia dua numero. Gi entenis regulan rubrikon pri Esperanto, far Laurent Vignaud. La kelkaj miloj da francaj esperantistoj eble povintus ĝin savi per tuja reago.

Revuo **Clés de l'Actualité - Junior** (por 8-12 jaraĝuloj), denove aludas pri Esperanto en sia numero 51, publikigante leteron de leganto: "Chers amis, je m'appelle Toufiq, j'ai 10 ans et je suis en CM2. J'ai beaucoup aimé l'article sur « l'aventure des langues » paru dans le n° 46. Mes parents aussi. Grâce à eux, j'ai découvert l'espéranto, ma seconde langue : c'est plus facile à apprendre et à parler, car elle est très logique et très amusante à construire. Et demain, peut-être elle sera la vraie

langue internationale à côté de chaque langue maternelle. Au revoir."

Ne estas la unua fojo, ke tiu juna Toufiq skribas al iu revuo pri Esperanto.

(informas Clair Mahé)

Revuo **Courrier international** de la semajno dum Expolangues faris specialan dosieron pri lingvoj: paĝon II de la suplemento troveblas listo de 12 servoj pri nekutimaj lingvoj, inkluzive Esperanton¹: kun subtitolo jena "ESPERANTO: une langue en devenir?" (Esperanto, onta lingvo?).

(informas Bruno Flochon)

Revuo **Science & Vie** de Aprilo, numeron 943, paĝon 143, aparte fias en artikoleto titolita "L'espéranto reste virtuel" (vidu sube) kiu meritas fortan rebaton.

Libroj

Adreso de JEFO kuŝas en la libro **Scènes de rock en France** (rokscenoj en Francio). (informas Thierry Daugu)

Internet

La ejo **Foreign languages for travelers**² prezentas diversajn lingvojn. La statistikoj montras ke Esperanto estas la 14a lingvo laŭ intereso de ties publiko (ĉefe anglalingvanoj) post la hispana, franca, germana, itala, angla, portugala, rusa, nedelanda, dana, norvega, sveda, turka kaj rumana.

(informas JeanSeb Brillaud)

Politiko

"Dank'al agado de Germain Pirlot (Ostende-Belgio) kaj kunlaborantoj de li tra Eŭropunio, al kampanjo por uzo de Esperanto ĉe la membroj de la Eŭropa Parlamento fine de Januaro, 66 eŭrodeputitoj de 7 landoj, favore respondis. Ok el ili estas Francoj.

Plia paŝo antaŭen venis de **Jean-François Hory** (Grupo ARE en la Parlamento, [kaj estro de la partio "Radical" de

L'espéranto reste virtuel... [el Science & Vie]

Toujours à propos de l'article « Demain, une seule langue sur la Terre? » (n° 940, p. 68), M. Francis Bernard, de Mortcerf (Seine-et-Marne) nous reproche de « passer sous silence la langue internationale, l'espéranto. Alors, censure, autocensure, ou ignorance du sujet? » Langue pourtant « logique, simple et rationnelle, qu'on peut assimiler dix fois plus rapidement qu'une langue nationale » selon Henri Loury, de Charbuy (Yonne).

L'espéranto est une langue artificielle, créée au XIX^e siècle par le médecin et linguiste polonais Lejzer Ludwik Zamenhof, dont l'objectif humaniste, était la communication universelle. Après la Seconde Guerre mondiale, l'espéranto fut promu quelque temps par les Soviétiques pour contrecarrer la suprématie de la langue anglaise. Mais les espérantistes expliquent eux-mêmes les entraves à son expansion. « Des anomalies très gênantes dans son orthographe ont toujours freiné et continuent à freiner la généralisation de l'usage de cette langue universelle neutre dans le monde contemporain », regrette M. Albert Lienhardt, de Mulhouse (Haut-Rhin), auteur d'une réforme de l'orthographe pour un espéranto modernisé.

Et, renchérit M. Georges Clopeau, de Saint-Gildas-de-Rhuys (Morbihan), au demeurant espérantiste, « une langue ne peut vivre que de communications entre les familles, d'œuvres littéraires diffusées et lues, de multiples échanges écrits et oraux. Elle ne peut vivre sans être utilisée à l'école, ni conserver son unité sans être enseignée. »

¹<http://www.tios.cs.utwente.nl/esperanto/>

²<http://insti.physics.sunysb.edu/~mma rtin/languages/langstat.html>

Bernard Tapie, ambaŭ sufiĉe famaj, pruve ĉiu havas sian pupeton en famega televidelsendo Ginjoloj de l'informado "Les Guignols de l'Info". Antaŭnelonge, SAT-amikaro eldonis malfaldaĵon titolitan "Eurobabel - L'union éclatée". En ĝi, paragrafo detale publikigas favorajn opiniojn de eŭrodeputitoj pri Esperanto kaj aparte tiujn de Francoj. Mi kaptis la okazon por sendi ekzempleron de tiu prospekto al la ok francaj deputitoj, ĉefe por sciigi al ili, ke iliaj diraĵoj ne falis en rubujon. En la koverton mi enŝovis poŝtkarton, kies teksto temas pri Esperanto en la Eŭropa Parlamento.

Kia estis mia miro, kiam mi ricevis unu el tiuj kartoj poŝtstampita de "Strasbourg - Parlement Européen". Per ĝi, Sinjoro Hory petis de mi centon da tiu modelo de poŝtkarto... "kiuj senditaj de Strasbourg - Parlement Européen al amikoj miaj, estus sama kvanto da reklamiloj por Esperanto", li skribis.

Ĉu necesas aldoni, ke pakaĵo je lia adreso, samtage estas enpoŝtigita?"

(informas Raymond Boré en *Le Travailleur Espérantiste*)

La 23an de Aprilo, pariza E-delegacio renkontas Gisèle Moreau, komunista eŭrodeputito, en la sidejo de **Franca Komunista Partio** (vidu apude).

Diversaĵoj

Dum Februaro filmatis en Parizo samideanoj Antoine Vernet kaj Louise Marin por reklamfilmo al tekstilfoiro produktita de **Radio Nova**.

Ambaŭ ina kaj malina voĉoj estos miksataj cele aspekti kiel sintezvoĉo parolanta strangan nekonatan lingvon.

Esperanto-delegacio en sidejo de FKP

Mardon la 23an de Aprilo, okazis kunsido inter delegacio de esperantistoj kaj du reprezentantoj de Franca Komunista Partio: Gisèle Moreau (eŭropa deputito) kaj Jean-Paul le Marec.

En la sidejo de FKP, placo de Colonel Fabien, La ĉefaj francaj E-asocioj sendis reprezentanton: Michel Audibert (radio Esperanto), René Ballaguy (distributiva ekonomio), Philippe Bérizzi (JEFO), Vincent Charlot (KEK), Robert Laudereau (FET), Pierre Lévy (komunista laborgrupo de SAT), Jean Marin (Bondy grupo), Albert Samson (francilia federacio de UFE), Robert Schley (vicurbestro de Orly, socialisto), s-ro Ripoché (fervojistoj). SAT-amikaro ne partoprenis.

La diskuto daŭris apenaŭ pli ol unu horo kaj estis filmata de RL.

Esperantistoj donis multe da argumentoj favore al Esperanto, menciis favorajn artikolojn, dirojn de famuloj, ktp:

- VC resumis por ĉiuj la nunan situacion: 73 eŭrodeputitoj respondis favore al Esperanto, 9 en Francio (5 maldekstraj kaj 4 dekstraj), 2 en la grupo "Gauche Unitaire Européenne" (Fausto Bertinotti kaj Gisèle Moreau). Notindas ke preskaŭ ĉiuj Belgoj respondis favore, verŝajne dank'al laboro de homoj kiel Germain Pirlot.
- JM proponis studkomisionon pri Esperanto kadre de Eŭropa Parlamento.
- RS: ĉiuj francaj ministroj pri edukado respondis same al demando de esperantistoj. Tio povus montri ke ne la ministro respondis sed lia kabinestestro (*chef de cabinet*).
- PL: la eŭropa sistemo iuflanke promocias plurlingvecon sed praktike iel perforte altrudas la anglan lingvon.
- PL: UEA jam faris peticion en 1954 kun 15 milionoj da subskriboj (2 milionoj individuaj), kiuj provokis rezoluciojn de Unesko.
- VC: 2 favoraj inter 34 grupanoj de G.U.E. estas ne sufiĉa.
- JM: Esperanto estas en la 5% el plej parolataj lingvoj.
- En diskuto preskaŭ nur pri instruado, VC sugestis ke la kompartio mem interesiĝu pri Esperanto, en sia propra strukturo, en la Festo de Homaro, ktp, kaj PB proponis ke inter la eŭropaj kompartioj, ili lanĉu Esperanton kiel laborlingvon. Tiajn pli precizajn demandojn trafis neniu vera respondo.

La du reprezentantoj de kompartio donis kelkajn informojn:

- Portugalaj kaj grekaj deputitoj tre batalas por siaj lingvoj, rifuzas diskuti aŭ baloti por tekstoj ne tradukitaj.
- La tuta Eŭropa Komisiono (inkluzive Emma Bonino de radikala partio) estrata de Edith Cresson subskribis en Aprilo 1995 kontraŭ ĉiu iniciato favore al Esperanto.
- JPM kritikis radikalan partion, kiu alianciĝis kun Berlusconi, trompas homojn, kaj ne tiom aŭdeble subtenas Esperanton.

Ambaŭ reprezentantoj de kompartio faris proponojn por puŝi efike la ideon laŭ politika vojo en Eŭropa Parlamento:

- E-movado skribu al komisiono pri kulturo kaj edukado, estrata de S-ino Castellina (grupo G.U.E.), kiam paralele komunistoj atentigos ĝin pri la demando.
- Ekzistas komisiono pri peticioj en la Eŭropa Parlamento. Sufiĉus kelkaj miloj da subskriboj por fari iniciatraporto (*rapport d'initiative*), ekzemple aŭtune 96. Oni bezonas raportanton (*rapporteur*) por ke ili analizu serioze nian problemon.
- delegacion de trideko da esperantistoj (diverslandaj) povus veni en Strasburgon, por renkonti la diversajn grupojn. La vojaĝo, ktp, povus esti finance helpitaj se oni antaŭvidas la aferon antaŭ sufiĉe da tempo.

JEFO-anoj ĉe la televido!

La 27an de Februaro, en pariza kabla televidkanalo **Paris Première**, Paul Amar invitis **Umberto Eco** inter la 20a kaj la 21a, por prezenti lian lastan libron kaj realudi pri la intaj.

Je la 20a horo kaj duono, Paul Amar ekas la temon Esperanto per filmado, montranta surstratan dialogon en Esperanto inter Antoine Vonnet, Hélène kaj Kreŝo Barkoviĉ. Voĉo klarigas la aferon, jene esperantigita: “ne temas pri nova sekto sed pri internacia lingvo kreita antaŭ cento da jaroj. Kvindek mil personoj parolas ĝin en Francio kaj du milionoj en la tuta mondo”. La tri samideanoj poste eniras trinkejon, kie ili retrovas Michel Audibert, Agnieszka Moreau, Magali Texier kaj Bernard de Gouvello. Sekvas intervjuetoj en la franca sed tradukitaj en Esperanto!



La grupo en la trinkejo

Antoine: “Esperanto estas mia hobbio kiel por aliaj estas velsurfo”. Michel klarigas la principojn kaj radikojn de Esperanto: “neniu gramatika escepto, oni malfacile povus fari pli simplan”. Kun muziko de la kompil’, estas montrataj albumo de Tinĉjo, tradukoj de francaj literaturaj klasikaĵoj, minitel-servon 3615 ESPERANTO, kaj “ĉar ili laŭnas modon”: internetan adreson.

“Esperanto havas neniun landlimon, nek devenan landon”. Kreŝo: “neniu ekonomia potenco puŝas la lingvon, tial ĝi ne estas

oficiale agnoskata”. Hélène: “Domaĝe ĝi ne estas pli lernata: homoj estus pli toleremaj, kiam oni komprenas la alian, oni ne timas lin”. Amar demandas al Eco: “Jen demando al vi, lingvisto, filozofo kaj vojaĝemulo: kial tiu fuŝo (france: *pourquoi cet échec*)?”.



Hélène klarigas franclingve pri Esperanto, sed kun subtitoloj esperantlingvaj

Eco respondas alude pri sia libro “*la quête de la langue parfaite*” (la serĉado de la perfekta lingvo): “Mi lernis la gramatikon de Esperanto por bone kompreni pri kio temas. Venis al mi du konkludoj.

Unue, ĝi estas tre tre bone farita (*c’est une langue très très bien faite*). Laŭ lingva vidpunkto ĝi sekvas ŝpar- kaj efik-kriteriojn admirindajn (*des critères d’économies et d’efficacité admirables*).

Due, ĉiuj movadoj pri internaciaj lingvoj fiaskis, sed ne Esperanto, kiu plu kunigas multe da homoj tra la mondo, ĉar malantaŭ Esperanto estas frateca, pacifista ideo. Ĉiteme esperantistoj suferis persekutojn dum nazismaj kaj stalinismaj tempoj. La forton de tiu idealo hodiaŭ gardas la komunumo de esperantistoj. Oni ne vere povas diri ke ĝi fiaskis. La kialo por sukceso de lingvo ĉiam estas ne-antaŭ-kalkulebla (*impondérable* prononcata de Eco kun akcento ĉiusilabe). Kial iam la latina malaperas, naskiĝas la franca, la itala [...]. Neniu politika potenco jam povis decidi. La lingvo estas biologika fenomeno. Pri Esperanto, necesos ke registaro

decidiĝu ĝin adopti, ekzemple Eŭropa Unio (Eco diris: *le Marché Commun*), Unesko, Uniiĝintaj Nacioj. Iu Franco de la komenco de la 19a jarcento (de Jorando aŭ iu nomo simila) analizis la problemon de internacia lingvo: ĉiam ĝi frontos egoismon de registaroj.”

“Daŭre estas Babelturo” subtile enŝovas Amar, kies sukcesfalo ĉiuminute pli kompreneblas.

Eco senatente daŭrigas: “La problemo de Esperanto ne dependas de Esperanto mem, sed de politikaj eventoj kiuj superas la volon de esperantistoj”.

Amar: “prave ke lingvo moviĝas laŭ sia tempo...” kaj tiel transpasas al sekva temo de la elsendo: nova vortaro pri lingvaĵo de la suburboj.



Umberto Eco —aŭtoro de pluraj libroj pri lingvoj— ofte aperas en televid- kaj radio-elsendoj


Tiun ĉi rubrikon kompilas
Philippe BERIZZI.

Por vivigi tiun rubrikon, sendu viajn kontribuojn al JEFO aŭ rekte al li.

Connaissez-vous l'origine du mot KROKODILO ? Dans le mouvement circulent les explications les plus fantaisistes. J.I. dévoile enfin pour ses lecteurs l'origine du mot KROKODILO.


Littéralement, *krokodilo* signifie *crocodile*. Il s'agit d'un saurien bien connu, notamment sur les bords du Nil ; il y en a peut-être encore quelques exemplaires au Jardin des Plantes de Paris ; ce reptile a la réputation légendaire de pleurnicher comme un bébé pour attirer ses proies. *Krokodili* signifie littéralement *faire le crocodile, avoir le comportement d'un crocodile*. Ces deux mots, *krokodilo* et *krokodili*, ont acquis un sens argotique depuis 1945, sous l'impulsion d'un coiffeur italien du Quartier Latin de Paris, **Napoleono Ferrari**. Vers la fin des années 50, après une longue période de gros problèmes de santé, il s'est noyé, peut-être accidentellement, dans le Canal Saint-Martin. Avant cette fin tragique, c'était un espérantiste original très actif et dynamique. Il participait pratiquement à toutes les nombreuses manifestations, excursions, etc., qui rassemblaient des dizaines de personnes plusieurs fois par semaine, à l'initiative des organisations espérantistes de la région parisienne. Il a toujours, ce qui n'est pas un exemple à suivre, refusé d'adhérer à quelque association que ce soit. Quand il était avec des espérantistes, il refusait catégoriquement de parler une autre langue que l'espéranto et prétendait même ne pas comprendre le français. Si quelqu'un s'adressait à lui dans ce dialecte, il se retournait vers un autre espérantiste, de préférence débutant, pour en attendre la traduction. Il avait inventé un « mouvement » (sans cotisation), le *sonolismo*, de S.N.L. = *Silenti Naci-Lingve* = *se taire en langue nationale*, principe qu'on peut considérer comme une méthode d'entraînement à l'utilisation de l'espéranto. Il appelait *krokodiloj*, c'est-à-dire *hypocrites*, les espérantistes chevronnés qui parlaient en français dans des réunions espérantistes parce qu'il jugeait que ces espérantistes *empêchent* les débutants de s'exercer à parler notre langue. Selon lui, l'espéranto doit servir à la communication et à l'éducation populaires antichauvine, et tous ceux qui s'y opposent sont des hypocrites, des ennemis du peuple et des fauteurs de guerre. Bien entendu, il englobait sans hésitation dans le terme *krokodiloj* les inventeurs de « dialectes » prétendus internationaux qui ne peuvent avoir d'autre effet pratique que de retarder le développement de l'utilisation de l'espéranto.

Petro LEVY (*estis N. Ferrari lia kombisto*).



Petite recette pour grandes surprises

Prenez les pages jaunes de votre département, cherchez à « Formation (organismes de) » et relevez les publicités pour les centres d'enseignement des langues qui certifient « toutes langues ».



Et maintenant, trouvez le centre qui vous proposera de s'arranger pour mettre à votre disposition un professeur de swahili ou à défaut de bahasa ou encore d'espéranto. Après le rejet de votre requête, demandez la liste exhaustive des langues que vous pourriez apprendre.

Vous avez le droit de présenter tous les prétextes pour vous intéresser à ces langues et à ces centres de formation. Nous comparerons dans un prochain bulletin les résultats que j'aurai reçus.

Alain FAÇOT

ANONCO

Korespondadon kun lesbanino aŭ senlaborulino serĉas Lucia-Mary, fidela JEFO-amino kaj subtenantino, kiu trovis bonegaj i.a. la lastajn artikolojn pri scienco, Grésillon kaj IJK. Skribu al ŝi:

Lucia-Mary Berthelin
36, rue Baudelaire
98800 NOUMÉA
NOUVELLE-CALÉDONIE

Le mot du président

Le temps passe et, mine de rien, nous voici à la veille de FESTO, retrouvailles inespérées avec la tradition de rencontres organisées par JEFJO.

Faut-il rappeler qu'un INK a même eu lieu en 1977 à Poitiers et a réuni 325 jeunes... Cela signifie-t'il que nous sommes sur la bonne voie ? Je le crois. Et malgré les difficultés, Je ne rentrerai pas dans le détail des multiples occasions lors desquelles l'équipe d'organisation de FESTO a failli abandonner. Nos emplois du temps sont pleins, nos centres d'intérêts multiples et les espérantophiles ne sont pas réputés pour être casaniers — du moins les jeunes. Le temps est la denrée la plus précieuse pour notre association. Les idées ne manquent toujours pas. Mais elles se précisent et se concrétisent aujourd'hui. Ainsi, l'idée d'Alain d'organiser un « çokolada seminaris » en Chartreuse (38) à la rentrée de septembre permettrait d'embrancher sur autre chose après la FESTO et de maintenir un rythme semestriel de rencontres. L'association y gagnera de la vie et de l'attrait pour de nouveaux membres. Nous pourrions alors, j'espère, plus facilement et plus intensément nous consacrer à l'autre objectif de JEFJO, l'information du grand public, en particulier des jeunes, et une présence la plus forte possible auprès des médias et collectivités locales.

Un mot sur les salons Expolanques (Paris) et Linguissimo (Lyon) qui se sont avérés plutôt satisfaisants. L'information des visiteurs a été de grande envergure, même si tous n'ont pas accepté de laisser leurs coordonnées. 250 adresses collectées à Expolanques dont plus de la moitié de jeunes pour 8 élèves en stage ensuite au siège et 40 adresses collectées à Linguissimo dont 35 de jeunes pour 15 élèves au cours de découverte qui a été lancé ensuite et qui va certainement perdurer comme un cours régulier.

Une rencontre est aussi une occasion de faire du bruit. Lors de FESTO, le concert public organisé à Lyon sur la péniche « La Marquise » le jeudi 16 au soir sera une occasion de médiatisation. L'information des médias a commencé un mois avant et des demandes de reportages, articles, interviews vont se succéder. Remercions à cette occasion UFE pour sa contribution financière de 5000 francs pour l'aide à l'organisation de cette manifestation publique visant à faire connaître l'espéranto auprès des jeunes.

Et vous n'avez aucun prétexte qui tienne pour ne pas assister à ce concert de rock et ne pas venir à FESTO puisque nous vous remboursons 50% de votre trajet jusqu'à Lyon (dans la limite de 200 francs pour les 40 premiers inscrits) grâce à une subvention de l'OFAJ (Office Franco-Allemand de la Jeunesse) destinée à rembourser une partie des frais de trajet des français et allemands.

Je relance un appel aux articles, en français ou espéranto, avec des illustrations, pour alimenter ce journal.

Je vous dis à bientôt, non pas au prochain numéro mais à Lyon pour FESTO, lors de laquelle, je vous rappelle, aura lieu l'assemblée générale de JEFJO. D'ici là, envoyez vos candidatures aux élections et vos suggestions pour l'ordre du jour.



-ement vôtre,

Bruno FLOCHON

Tra Rumanio per Pasporta Servo

En Aŭgusto 1993, revenante de la TEJO-kongreso ĵus okazinta en Vraca, Bulgario, mi traveturis Rumanion kaj tie en trajno ekbabilis (franclingve) kun Rumano. Ni de tiam korespondas iomete kaj antaŭ kelkaj monatoj, mi ekhavis la ideon lin viziti. Tamen, ĉar Rumanio estas lando relative malproksima de Francio, mi decidis, ke mi profitos la vojaĝon por samtempe renkonti tieajn esperantistojn, kiuj eble ne ofte estas vizitataj de eksterlandanoj, kaj kiuj mem ne povas multe vojaĝi pro manko de mono. Kaj ja tia estas la situacio.

Dum pasinta Januaro, mi skribis al la dek tiulandaj gastigantoj de Pasporta Servo (PS) kaj ek- Februare, mi jam estis ricevinta ok respondojn. Bedaŭrinde, en sep tagoj da vojaĝo, mi ne sukcesis renkonti ĉiujn: nur ses.

Mi zorgis ankaŭ pri pasporto kaj vizo por Rumanio (por Hungario, Francio ne bezonas vizon). Pri monoj hungara kaj rumana, ne eblas ekhavi en Francio: oni devas ŝanĝi surloke. (Mi ne konsilas la vojaĝ-ĉekojn en Rumanio, ĉar mi opinias, ke ankoraŭ tre malmult-loke eblas uzi ilin).

Do, post tiuj preparoj, de la 8a ĝis la 14a de Marto 1996, mi restadis en Rumanio (pli precize mi diru "mi moviĝis en Rumanio!" cele al vizito de kiel eble plej multaj E-istoj).



Jen do, senorde, kelkaj (interesaj?) vojaĝo-notoj pri tiu vojaĝo en Rumanio dank'al la Pasporta Servo. Mi aldonas proprajn pripensojn, kiuj eble ne ĉiam estas objektivaj! En dua parto de la teksto, mi kunigis konstatojn pri la transportoj, la prezoj, ktp.

[NDLR: aperonta en venonta numero].

Se vi konstatis la malon, se vi ne konsentas kun miaj pripensoj, ne hezitu skribi tion al via "amata" bulteno *JEFO Informas*.

En août 1993, en revenant du congrès de TEJO qui venait juste d'avoir lieu à Vraca, en Bulgarie, j'ai traversé la Roumanie et là dans un train, j'ai commencé à bavarder (en français) avec un Roumain. Depuis, nous correspondons un petit peu et il y a quelques mois, j'ai eu l'idée de lui rendre visite. Cependant, étant donné que la Roumanie est un pays relativement éloigné de la France, je décidai que je profiterai de mon voyage pour rencontrer en même temps des espérantophones du coin, qui peut-être ne reçoivent pas souvent la visite d'étrangers, et qui eux-mêmes ne peuvent pas beaucoup voyager par manque d'argent. Et c'est bien ainsi qu'est la situation.

En janvier dernier, j'ai écrit aux dix membres du *Pasporta Servo* (PS) dans ce pays et au début de février, j'avais déjà reçu huit réponses.

Malheureusement, en sept jours de voyage, je n'ai pas réussi à tous les rencontrer: seulement six.

Je me suis occupé aussi du passeport et du visa pour la Roumanie (pour la

Hongrie, les Français n'ont pas besoin de visa). En ce qui concerne l'argent hongrois et roumain, il n'est pas possible d'en avoir en France: on doit changer sur place. (Je ne conseille pas les chèques de voyages en Roumanie, car je pense qu'il n'est possible de les utiliser encore que dans très peu d'endroits).

Donc, après ces préparatifs, du 8 au 14 mars 1996, j'ai séjourné en Roumanie (plus précisément, je dois dire « j'ai circulé en Roumanie! » dans le but de visiter le plus d'espérantophones possible).

Voici donc, en désordre, quelques notes de voyage (intéressantes?) sur ce voyage en Roumanie grâce au *Pasporta Servo*. J'ajoute quelques réflexions personnelles, qui ne sont peut-être pas toujours objectives! Dans une deuxième partie du texte, j'ai réuni quelques observations sur les transports, les prix, etc.

[NDLR: à paraître dans le prochain numéro.]

Si vous avez constaté le contraire, si vous n'êtes pas d'accord avec mes réflexions, n'hésitez pas à l'écrire à votre bulletin « adoré » *JeunEspéranto-INFO*.

Tra Rumanio per Pasporta Servo

Unua vespero en Rumanio

Mi ĵus alvenis en la unuan urbon de la Pasporta Servo, sed mi havas neniom da rumana mono. Tamen, mi demandas taksiiston, kiom kostas la veturo, en germanaj markoj. Li iomete pripensas, (vidas ke mi venas el okcidenta Eŭropo, do mi estas "riĉa") kaj respondas "5 markojn" (t.e. ĉ. 17,5 frankoj). Mi konsentas sed poste ekscios, ke normala prezo estas 0,5 DEM! Post kelkaj stratoj, li lasas min ĉe la piedo de domo. Mi montras la PS-adreson al pluraj homoj: ŝajnas, ke la koncerna domo ne ekzistas! Kaj mi ne havas rumanajn monerojn por telefoni! Feliĉe, tre servema vendisto demandas mem aliajn homojn, kaj finfine telefonas al la PS-gastiganto, kiu tuj alvenas! Kaj vespere, post vespermanĝo, ni kune iras promeni nokte en la urbon.

La morgaŭan matenon, post telefon Alvoko de la alia PS-gastiganto el la sama urbo, ni renkontiĝas kaj babil-promenas, denove en la urbo-centro, ĉi-foje je la taglumo.

